TEJO-aktuale: numero 402, 2015-02

## La laboro pri la renovigita reTEJO daŭre progresas

Baldaŭ ĝi transiros al la sekva paŝo: tradukado. Por tiu etapo ni bezonas kunordiganton. Ĉu eble vi ŝatus kunordigi la tradukadon de http://tejo.org? Ĉu vi ŝatas traduki http://tejo.org? Legu pli: http://tejo.org/2015/01/sercata-kunordiganto-de-tradukado-de-tejo-org/

## Daŭre eblas kandidatiĝi por “Civita Servo en la departemento Côtes d'Armor en Bretonio, Francio”!

Nia asocio "Armor E-o" decidis, ke la servo komenciĝos la 1-an de aprilo 2015.

Se vi interesiĝas, sendu vian kandidatiĝon (kun vivresumo kaj motiviga letero) al Laurent Peuch (ltpeuch ĉe hotmail.com)

Por la prezidanto Laurent Peuch (ltpeuch ĉe hotmail.com), Jérôme Caré

## La 1-a Internacia Junulara Renkontiĝo (IJR-01), Nankana Sahib, Pakistano, 18-a ĝis 20-a de septembro 2015

Por maturigi la junularan movadon en sudazia regiono kaj najbaraj landoj. Pliaj informo ĉe jepoficejo ĉe gmail.com kaj adeelbutt ĉe asia.com

## [ret-info] Juna Amiko - 40 jaroj - ĉiuj numeroj en la reto!

*Malsukcesa elŝuto.*

## [UEA - Universala Esperanto Asocio] Se vi pensas ke estas ankoraŭ 6 monatoj inter nun kaj la 26-a de julio, vi ne scias kiel rapide flugas la tempo.

*Malsukcesa elŝuto.*

### Kastelo Greziljono anoncas sian programon kaj serĉas kunlaborantojn por aŭgusto

Kara amikoj,

la franca Esperanto-kastelo informas pri sia programo:

2015-apr-03/08: Renkontiĝo de Interkant’ kaj kunkantado kun La Kompanoj

2015-apr-17/25: PRINTEMPaS, intensivaj kursoj kun Zs. Korody, Ch. Chazarein, M. Quenut - vidu rete http://gresillon.org/printempas

2015-apr-25/26: PRINTEMPaS, internaciaj KER-ekzamenoj (B1, B2, C1) - vidu rete http://gresillon.org/printempas

2015-jul-20/25: Reĝaj ekskursoj, UK-antaŭkongreso - vidu rete http://gresillon.org/s2

2015-aŭg-01/08: Lingva semajno, Lingvofestivaleto, tuj post UK - vidu rete http://gresillon.org/s3

2015-aŭg-08/16: Festa Semajno por infanoj kaj familioj - vidu rete http://gresillon.org/s4

2015-oktobro-17/25: AŬTUNE, lingva seminario kun Christian Rivière k.a. http://gresillon.org/AŬTUNE

Jara agendo/kalendaro en http://gresillon.org/agendo

Por la aŭgustaj semajnoj aŭ poste, ni bonvenigas viajn proponojn por instrui vian lingvon aŭ Esperanton, por prelegi/koferenci aŭ por animi aktivaĵojn por infanoj. Skribu al bertox ĉe free.fr

Maison Culturelle de l'Espéranto / EsperantoKulturDomo

Château de Grésillon

St. Martin d’Arcé

49150 BAUGÉ-EN-ANJOU

France

+33-241 89 10 34

### Novaĵoj pri Interkant

- Ni kreis novan diskutliston ''interkant-amikoj'' por informi la simpatiantojn pri la ĉefaj eventoj de nia asocio. Se vi deziras aliĝi tiun liston, bv. sendi malplenan mesaĝon al interkant-amikoj-subscribe ĉe yahoogroupes.fr

- Nia venonta staĝo okazos kiel planite, de la sabato, la 4-a de aprilo ekde la 10-a ĝis la merkredo, la 8-a de aprilo, ĝis la 16-a (eblas alveni vesperon de la 3-a de aprilo) en Grésillon. Tie kaj tiam ni finpreparos nian spektaklon por Lille2015, tio estas ero de pli impona spektaklo pri la historio de Esperanto. Ĉar ni decidis jam antaŭ unu jaro, ke iu ajn povas membriĝi iam ajn en la grupo, vi povas kompreneble partopreni tiun staĝon kaj vi povas venigi ankaŭ aliajn homojn, novajn esperantistojn. Nia spektaklo entenos kantojn, dancojn, muzikojn, teatraĵojn.

Samtempe en Grésillon kunvenos La Kompanoj por ekzercadi pri sia stratkantado en Lillo; tio estas tre oportuna kaj ĝojiga okazo kunigi samloke muzikemulojn, kantemulojn, kaj de tio povos naskiĝi novaj kontaktoj kaj amikecoj. Kaj tio donos eblecon al la du grupoj interŝanĝi spertojn, fortojn, ideojn, havi komunajn atelierojn (ekzemple varmigo de la voĉoj)…, vi povas konsulti la TTT-ejon de La Kompanoj: http://lakompanoj.free.fr/ por havi informojn kaj partiturojn.

Vi povas aliĝi al tiu renkontiĝo rekte de la retejo http://gresillon.org

Vi alklaku la staĝon ''Interkant" en la kategorio ''kursoj'', tio signifas ke vi devos pagi po 10 € tage, sed kompense, vi rezervu ĉambron 6-litan, do po 9 € nokte kaj vi skribu en komento kian ĉambron vi deziras. Ĵanik respondecas pri la staĝo kaj kiel kutime aranĝos la kunĉambrigadon laŭ la deziroj.

Se vi havas problemojn por aliĝi, ne hezitu kontakti Manjo (manjo.clopeau ĉe gmail.com) aŭ Janik (jannick.huet ĉe free.fr).

### 2015.02.07: Sekvo de la prelegserio de Claude Gacond en CDELI: instrui Esperanton per la didaktika afiŝaro

Kulturaj sabatoj de CDELI. Prelegserio de Claude Gacond pri la Esperanto-instruado per la didaktika afiŝaro. Venontaj datoj: 7-a de februaro kaj 6-a de junio 2015. Legu pli kaj aliĝu: http://www.cdeli.org/Eventoj-de-CDELI.html

### Aperis nova eldono

- La Riverego 118: la reprezentantoj de UEA "sciuras" en Montrealo! http://www.esperanto.qc.ca/

- Kern.punkt.info pri matematiko: http://kern.punkto.info/2015/01/22/kp012-matematiko/

- Varsovia Vento Elsendoj prezentas La Perdita Generacio: http://www.podkasto.net/arkivejo/intervjuo-kun-la-perdita-generacio/

### Venontaj renkontiĝoj

22-a Staĝo de Tut-P.E-Ko, Ariège, Francio, 14a ĝis 21a de februaro 2015. Petu pliajn informojn de JORGOS: tel-n° 33 / 0 468 605 417 aŭ retadrese tutpeko ĉe aliceadsl.fr

Studsabato- en CDELI, La Chaŭx-de-Fonds, Svislando, 21a de februaro 2015, Esperantokursoj kun tri niveloj. Inf.: Nancy Fontannaz, Ruisselet 9, CH-1009 Prilly, Svislando. Rete: nancy.fontannaz ĉe gmail.com kaj http://www.cdeli.org/

11-a Internacia Himalaja Renkontiĝo, Nepalo, de la 26-a februaro ĝis la 8-a de marto 2015, http://www.esperanto.org.np/

Studsabato- en CDELI, La Chaŭx-de-Fonds, Svislando, 21a de marto 2015, Esperantokursoj kun tri niveloj. Inf.: Nancy Fontannaz, Ruisselet 9, CH-1009 Prilly, Svislando. Rete: nancy.fontannaz ĉe gmail.com kaj http://www.cdeli.org/

JER 2015 - Junulara Esperanto-Renkontiĝo, Verőce, Hungario, 27-a ĝis 29-a de marto 2015, https://www.facebook.com/events/362282067278791/

Internacia Junulara Festivalo 2015, Brusono, Aosta Valo, Italio, 1-a ĝis 7-a de aprilo 2015, http://iej.esperanto.it/ijf

31a Printempa Semajno Internacia (PSI), Winterberg, Germanio, 3a ĝis 10a de aprilo 2015, http://www.esperanto.de/psi

16-a Israela E-Kongreso, Jehiam, Israelo, de la 16-a ĝis la 18-a de aprilo 2015, http://esperanto.org.il/dosieroj/IK16_unua_informilo.pdf

Studsabato- en CDELI, La Chaŭx-de-Fonds, Svislando, 18a de aprilo 2015, Esperantokursoj kun tri niveloj. Inf.: Nancy Fontannaz, Ruisselet 9, CH-1009 Prilly, Svislando. Rete: nancy.fontannaz ĉe gmail.com kaj http://www.cdeli.org/

Germana Esperanto-Kongreso, Hameln, Germanio, 22-a ĝis 25-a de majo 2015, http://www.esperanto.de/gek2015

Studsabato- en CDELI, La Chaŭx-de-Fonds, Svislando, 20a de junio 2015, Esperantokursoj kun tri niveloj. Inf.: Nancy Fontannaz, Ruisselet 9, CH-1009 Prilly, Svislando. Rete: nancy.fontannaz ĉe gmail.com kaj http://www.cdeli.org/

Elfriden, Stockholm, Svedio, 27-an de junio 2015, kontaktu Martin Strid (martin.strid ĉe gmail.com)

Roskilde Festivalo 2015, Roskilde, Danio, 27a de junio ĝis 5a de julio 2015, https://www.facebook.com/events/682411408505748/?ref=73&source=1 kaj http://roskilde.festoklubo.dk/

Somera Esperanto-Studado (SES 2015), Martin, Slovakio, 11-a ĝis 19-a de julio 2015, http://ses.ikso.net/2015/sk/

48-a ILEI konferenco en 2015, Oostende, Belgio, 17a ĝis 25a de julio 2015, http://ilei.info/

88a SAT-Kongreso, Nitra, Slovakio, 8a ĝis 15a de aŭgusto 2015, http://sat.ikso.net/

100a Universala Kongreso, Lille, Francio, 25a de julio ĝis 1a de auĝusto 2015
http://uea.org/kongresoj/uk_2015.html

IJK, Wiesbaden, Germanio, 2a ĝis 9a de aŭgusto 2015, http://www.tejo.org/ijk
IJS 2015 - La 26-a Internacia Junulara Semajno, Szentgotthárd, Hungario, 10-a ĝis 17-a de aŭgusto 2015,
https://www.facebook.com/events/349346985247258/

31-a ARKONES, Poznań, Pollando, 25a de septembro 2015, http://www.arkones.org

SFERO, Broc, Kantono Friburgo, 25a ĝis 27a de septembro 2015, http://alawa.ch/wp/sfero/ kaj
https://www.facebook.com/groups/225040314217529/

15a Kafoklaĉo Kaj Ludoj dum REnkontiĝo Semajnfina (KoKoLoRES) LA renkontiĝo por ludemuloj, Germanio, 1a ĝis 4a de oktobro 2015, http://www.krokodilo.de/kokolores/kokolores.php

Pliaj renkontiĝoj haveblas en la Internacia Kalendaro: http://www.eventoj.hu